

# Esperanto por UN

## Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 57, marto-aprilo 2022



Universala Esperanto-Asocio

## Internacia Tago de la Gepatra Lingvo 2022: Festante la kulturen kaj lingvan diversecon de la mondo



La 21-a de februaro, 2022, la Tago de la Gepatra Lingvo, estis tago kiam Universala Esperanto-Asocio dediĉis apartan atenton al la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko “festi la kulturen kaj lingvan diversecon de la mondo.” La mesaĝo de la Asocio al UN kaj Unesko okaze de tiu speciala observo de UN laŭdis lingvan diversecon kiel “riĉaĵon kiun ni devas protekti kaj antaŭenigi.” Respekto al lingva diverseco “estas vojo al plena observo de homaj rajtoj.”

En sia mesaĝo, UEA aparte atentis indiĝenajn lingvojn kaj la tiurilatajn planojn de la Asocio: “La jaro 2022 markas la komencon de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj 2022-2032, kiu ankaŭ estos traktata de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo, Kanado, en aŭgusto 2022. Sub la temo *Lingvo, vivo, tero:*

*Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj*, homoj el dekoj da landoj pritraktos la situacion de indiĝenaj komunumoj kaj iliaj lingvoj. Per la internacia lingvo Esperanto, ni instigas tutmondan dialogon kaj kunlaboron por la konservado, revigligo kaj antaŭenigo de indiĝenaj lingvoj.”

La mesaĝo atentigis, ke “Lingvoj estas ĉe la kerno de identeco, komunikado, socia integriĝo, edukado kaj evoluigo. La plej vasta uzado de lingvoj estas vojo al inkluziveco, por ke neniu estu forlasita. En tiu senco, gravas edukado en gepatraj lingvoj, precipe de infanoj, tiel ke ili havu la plej bonan fundamenton por daŭra kleriĝo ... Manko de lingva aliro malhelpas la celon liveri bonkvalitan edukadon por ĉiuj ĝis 2030 (Celo por Daŭripova Evoluigo n-ro 4). Multlingvismo, kiu ebligu kiel eble plej vastan utiligon de gepatraj lingvoj, estas vojo por potenci edukadon kaj permesi al ĉiu individuo disvolvi sin.”

“Kompreneble, la edukado alfrontas aliajn defiojn, kiel ekzemple garantii aliron al lernejoj por ĉiuj infanoj kaj bonajn kondiĉojn por instruistoj. Tamen, la lingva demando ĉiam ĉeestas, kaj ne pritrakti ĝin estas grava eraro.”

Krome, “La gepatra lingvo formu la fundamenton de edukado, sur kiu eblos poste akiri aliajn lingvojn por bone funkcii loke, nacie, kaj internacie. En tiu rilato, la internacia lingvo Esperanto malfermas pordojn al plene internacia komunumo kiu kovras la tutan mondon.”

Se elementa edukado en la gepatra lingvo gravas por permesi al ĉiuj gejunuloj egalan eblecon lerni kiel oni lernu, sen malhelpo de lingvaj bariloj, egale gravas, ke oni konstruu pontojn inter lingvoj. Kiel Universala Esperanto-Asocio atentigas, la antaŭenigo de lokaj lingvoj okazu paralele kun klopodoj kultivi tutmondajn komunikilojn, kiel ekzemple la internacian lingvon Esperanton, kiuj same baziĝas je egaleco kaj facilco de aliro. Egaleco de aliro al edukado estu akompanata de egaleco de internacia komunikado.

## **Neniam plu: UEA funebras la Holokaŭston**

Okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro, la 27-an de januaro, en mesaĝo al Unuiĝintaj Nacioj nia Asocio funebris “la milionojn da homoj kiuj perdis siajn vivojn,” kaj honoris “tiujn kuraĝajn individuojn, kiuj helpis savi la vivojn de aliaj kiuj alikaze pereus.”

Universala Esperanto-Asocio aparte funebris la milojn da parolantoj de Esperanto kiuj mortis: ili estis “ŝtatoficistoj, instruistoj, kuracistoj, ĵurnalistoj, laboristoj – individuoj el ĉiuj sferoj de la vivo.” Inter ili estis familianoj de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu en 1887 kreis Esperanton: “Lia filo Adamo estis arestita kaj, komence de 1940, mortpafita; en la jaro 1942 liaj filinoj Zofia kaj Lidia estis murditaj en Treblinka, kune kun lia fratino Ida. Nur la filo de Adamo, Ludoviko, mirakle transvivis, dank’ al la propra lerto kaj la protekto de li kaj la patrino fare de Pastro Merceli Godlewski, de la Paroĥo de Ĉiuj Sanktuloj en la varsovia Placo Grzybowski. Tiel, Pastro Godlewski kaj aliaj similaj homoj helpis vivteni la esperon kiu troviĝas eĉ en la nomo Esperanto.”

UEA decidis aparte memori en la jaro 2022 la filinon de L. L. Zamenhof, Lidia, kiu estis murdita en la jaro 1942 en la mortigejo Treblinka: “Lidia Zamenhof internacie aktivis por disvastigi la lingvon kaj ideojn de la patro, precipe Homaranismon, la Zamenhofan idearon de humanista universalismo... La Nazia Germanio persekutis Esperanton ĉar ĝia kreinto estis judo kaj pro la tutmondistaj kaj homrajtaj idealoj de la Esperanto-movado. Dum restado en Usono por disvastigi la internacian lingvon kaj bahaismon, Lidia petis plilongigon de la vizo, sed estis rifuzita de la usona enmigra instanco. Ŝi do estis devigata reiri al Pollando. Baldaŭ poste, sekve de la invado de Pollando en septembro 1939, Lidia estis akuzita pri disvastigo de kontraŭ-nazia propagando en Usono kaj arestiĝis... Okaze de la 80-a datreveno de ŝia forpaso, UEA okazigos en 2022 diversajn aranĝojn honore al la ‘filino de Esperanto’”.

La mesaĝo klarigas, ke “La Esperanto-movado aparte funebras tiujn kiuj, pro sia raso aŭ fizika kondiĉo aŭ pro siaj politikaj aŭ sociaj konvinkoj, pereis per la manoj de la naziistoj. Inter ili estis multnombraj parolantoj de Esperanto en Germanio, Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj aliloke. Kaj inter la transvivantoj troviĝis ankaŭ esperantistaj herooj kiuj ŝirmis aliajn kontraŭ ekstermiĝo.”

“Ni solene promesas, fronte al la ekzemplo de la Holokaŭsto, fari nian eblon rezisti maljustecon kie ajn kaj kiam ajn ĝi okazas.”

## Komuna mesaĝo pri edukado pledas por patrinlingva edukado kaj utiligo de Esperanto



Universala Esperanto-Asocio kune kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) mesaĝis al Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj okaze de la Internacia Tago de Edukado, 24 januaro 2022. Unuflanke ili laŭdis UN kaj Uneskon pro ties atingoj en la kampo de klerigo; aliflanke ili atentigis, ke la vojo antaŭen longas kaj malfacilas: “Malgraŭ la salutindaj klopodoj de Unesko kaj aliaj internaciaj organizoj, la vojo al profunda kaj egaleca edukado restas blokita kontraŭ milionoj da junaj homoj tra la mondo. En la jaro 2018, proksimume 260 milionoj da infanoj de la koncerna aĝo ne frekventis lernejojn – kaj en aprilo 2020 dum furiozis KOVIM-19, tiu nombro saltis provizore al 1,6 miliardoj.”

“Se ĉiuj infanoj en la mondo ricevus klerigon en lingvoj kiujn ili plene komprenus kaj kun aliro al moderna teknologio, nia kapablo alfronti mondajn problemojn vaste pligrandiĝus, niaj rezervoj de homa kapitalo estus multe pli altaj, kaj la Celoj de UN por

Daŭripova Evoluigo estus multe pli proksimaj al plenumiĝo.”

“La Esperanto-movado forte subtenas altkvalitan edukadon por ĉiuj, inkluzive de edukado tra la tuta vivo. Nia movado kunigas la homojn, virtuale kaj ĉeeste, pere de la Internacia Lingvo, el multe pli ol cent landoj tra la mondo. Multaj parolantoj de Esperanto estas instruistoj, kaj multaj estas gejunuloj kiuj kredas, ke internacia kunlaboro estas la ŝlosilo por la pliboniĝo de la homaro, kaj kiuj komuniĝas inter si en unusola lingvo en internacia medio.”

## Esperanto-junularo alfrontas seksismon

La studsesio “**X-Lingvo: la efiko de seksismo en ĉiutaga komunikado**”, organizita de la esperantista junulara organizo **TEJO** kunlabore kun la **Konsilio de Eŭropo**, lastatempe okazis en ĉeesta formo en la Eŭropa Junulara Centro en **Budapeŝto** (EYCB). Entute 26 partoprenantoj alvenis, konatiĝis kaj esploris siajn atendojn pere de diversaj ekzercoj de teamkonstruado. Sekvis semajno plena je lernado kaj kunhavigo de scipovo. La evento estis komence planita por septembro 2020 sed estis prokrastita pro la malfacila situacio rilate al KOVIM-19. Ĝi okazis tute en Esperanto.

## Esperanto-parolanto estas nova prezidanto en akademio de la kataluna lingvo

Nicolau Dols, parolanto de Esperanto kiu naskiĝis en Majorco, estos la nova prezidanto de la Filologia Sekcio de la Institut d'Estudis Catalans, konsiderata kiel la Akademio de la Kataluna Lingvo. Nicolau Dols estas profesoro de la Universitato de Balearoj kaj gastprofesoro de la Programo pri Postdiplomaj Studoj de Interlingvistiko en la Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano, Pollando. Li estis kunprezidanto de la organiza komitato de la simpozio pri la kultura heredaĵo de Esperanto, kiu okazis ene de la 51-a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kunlabore kun la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED) kaj Hispana Esperanto-Federacio (HEF).

## Indiĝenaj lingvoj estos temo de la kongreso de UEA en Montrealo

Eksa prezidanto de UEA kaj profesoro pri edukado d-ro Mark Fettes reĝisoros la kongresan temon de la 107-a Universala Kongreso en Montrealo en aŭgusto, laŭ lastatempa anonco. Mem kanadano, Fettes esploras kaj verkas pri lingvopolitikaj kaj edukaj aspektoj de indiĝenaj lingvoj jam de tridek jaroj.

La temon de la montreala kongreso inspiris la decido de UN kaj Unesko plukonstrui sur la spertoj de 2019, la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, per dekjara komuna strebado. Per la temformulo "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj" UEA inaŭguras sian propran kontribuon al la Jardeko (2022-2032). Unuflanke, temas pri grava aspekto de la lingvaj rajtoj: simile kiel esperantistoj kontraŭas la altrudon de la lingvoj de pli grandaj aŭ fortaj popoloj al aliaj malpli fortaj, ili ankaŭ emas subteni la strebojn de diversaj popoloj por revalorigi kaj plu disvolvi siajn proprajn lingvojn. Sed, aliflanke, ekzistas ankaŭ dua, grava flanko de la temo: la kontribuo de indiĝenaj lingvoj al nia kompreno pri daŭripova evoluigo kaj la repaciĝo de homaj rilatoj kun la Tero.

"En Montrealo niaj kongresanoj havos okazon kleriĝi pri unuopaj, fascinaj lingvoj kiel la inuka, la aniŝnaba aŭ la kanjenka, kaj ankaŭ lerni iom pri la enkadriĝo de indiĝenaj lingvoj en la kompleksa lingvopolitika pejzaĝo de Kanado," Fettes klarigas en sia enkonduka prezento de la temo en la revuo *Esperanto*. "Sed ni ankaŭ rigardos freŝan tradukon de la Deklaracio pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, diskutos pri la signifo de indiĝenaj lingvoj por la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kaj konsideros, kion diras nuntempaj indiĝenaj verkistoj kaj pensuloj pri la evoluo de homaj socioj."